

# ***Kluba Bulteno***

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

**N-ro 1 2017**

**Ĵaŭdon la 12an de januaro**

**65a jaro**

---

## **Kalendaro**

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

**Lundo la 16a de januaro** (semajno 3) – *mandag*

Asbjørn Lindh kaj Kjell Peder Hoff vizitis E-kunvenojn en Pollando. Kiajn impresojn ili havas, kaj kiel fartas la movado en Pollando kompare kun ĉe ni?

*Asbjørn Lindh og Kjell Peder Hoff har besøkt Esperantomøter i Polen. Hvilke inntrykk har de, og hvordan går det med bevegelsen i Polen, sammenlignet med her hos oss?*

**Mardo la 7a de februaro** (sem. 6) – *tirsdag*

Studkunveno; tradukado de kajero pri malnovaj metioj. Daŭrigo de la laboro 5. majo kaj 6. decembro.

*Studemøte: oversettelse av hefte om tradisjonelle håndverksyrker.. Fortsettelse av arbeidet 5/5 + 6/12.*

**Lundo la 20a de februaro** (semajno 8) – *mandag*

Por novuloj/ komencantoj. Ni respondos iliajn demandojn kaj klarigos kiel eblas utiligi Esperanton. Se tamen ne venos novuloj, ni traktu la diskutojn pri UEA en *Libera Folio* (liberafolio.org)

*For nykommere. Vi svarer på spørsmålene deres og forteller hvordan man kan bruke esperanto. Kommer det ingen nye, ser vi på diskusjonene om UEA på Libera Folio (liberafolio.org)*

**Mardo la 7a de marto** (semajno 10) – *tirsdag*

JARKUNVENO. Vidu la 3. paĝon.

*ÅRSMØTE. Se 3. side.*

**Lundo la 20a de marto** (semajno 12) – *mandag*

Studkunveno, kiel 20. februaro.

*Studemøte, som 20 februar.*

---

## **La Landa Kongreso**

Ĉi-jare okazos Landa Kongreso de vendredo la 2a ĝis dimanĉo la 4a de junio, en Sandnes. Detaloj venos en *Norvega Esperantisto*.

# OKAZIS

## ***Pasporto al la tuta mondo*** (21.11)

Ni spektis per komputilo kaj granda ekrano la kurs-filmon *Pasporto al la tuta mondo* – la du unuajn el la 16 lecionoj.

Kun la kurslibro (kiun ni ne havas) ĝi estas rekomendinda kiel amuza helpilo por memlernado.

## **Malnovaj metioj – tradukado** (6.12)

Ni daŭrigis la prilaboradon de traduko de malfacila teksto pri malnovaj metioj, sub lerta gvido de akademiano Otto Prytz. Poste ni aŭdis i.a. pri la vigla aktivado de E-klubo en Kamembe, Ruando, kiu havas dudekon da lernantoj, pri-

zorgas multajn lokajn orfojn kaj baldaŭ lanĉos lokan radisendadon.

## **Libroprezentoj** (19.12)

Ĉu ni kapablas paroli en Esperanto pri integraloj kaj determinantoj? Antaŭ kelkaj tagoj estis la Tago de la Esperanta Libro, kaj ni trafoliumis eble la plej fruan eldonaĵon en nia biblioteko: *Matematika Terminaro kaj Krestomatio*, el 1905. Ni konatiĝis ankaŭ kun *Faktoj kaj Fantazioj* (1984), studlibro en 52 ĉapitroj kun fabeloj el foraj mondpartoj kaj multaj (memfaritaj) proverboj de Marjorie Boulton.

## **Esperoj por 2017** (3.1.2017)

[La anoncita kunveno ne okazis.]

---

## **Kromekzempleroj**

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

---

## **Fondaĵo Gustavsens:** Fra retningslinjene /gvidlinioj:

*Fondet er på over 100 000 kr og gir støtte til aktiviteter som fremmer esperanto, slik som studiereiser, deltaging på viktige nasjonale og internasjonale treff og ulike andre tiltak som styret finner det viktig å støtte. Det gis støtte både til slike tiltak som er av direkte nytte for esperantobevegelsen og til slike tiltak som mer er til glede for den enkelte søker. Esperantobevegelsen og esperantomiljøet generelt anses å være tjent med begge deler.*

*Støtte gis normalt bare til klubbmedlemmer under 30 år, men kan også i spesielle tilfeller gis til andre klubbmedlemmer. Medlemmene kan søke individuelt eller gruppevis.*

# Jarkunveno / Årsmøte, mardon / tirsdag 7. marto

## Tagordo / Dagsorden

- |  |  |
|--|--|
| 1. Aprobo de la kunvoko  | 1. Godkjennelse av innkallingen.   |
| 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.   | 2. Valg av møteleder og referent.  |
| 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retpoŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)  | 3. Årsrapport (sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den).  |
| 4. Jarkalkulo (same)   | 4. Årsregnskap (sendes på samme måte)  |
| 5. Eventualaj ricevitaj proponoj*.   | 5. Eventuelle innkomne forslag* .  |
| 6. Elekto de estraro**, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono, ĉiuj kun anstataŭanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono. | 6. Valg av styre**, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité. |

\* **Proponoj** atingu la estraron tri semajnojn antaŭ la jarkunveno *tre uker før årsmøtet*, do ĝis mardo la 14a de februaro (semajno 7). (Por proponoj de statutŝanĝoj la limdato estis la 10a de januaro.)

\*\*Vakas pluraj postenoj en la estraro. *Vi mangler folk til styret.*

Bv. sendi (sin)proponojn. *Send gjerne forslag – på deg selv eller andre.*

---

## Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – *leie møterom?*

Nia kunveno estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.*

---

**Vizitkartoj** Ankoraŭ restas vizitkartoj kun la adresoj i.a. de la senpagaj E-retkursoj lernu.net kaj (la angla) duolingo.com.

# Vizito al Pollando

de Asbjørn Lindh

En novembro mi vizitis kunvenon en la loka Esperanto-klubo en Łódź (prononcu ŭuĝ), Esperante Lodzo. Łódź estas iam industria urbo situanta en la mezo de Pollando. Kun sia 698.688 loĝantoj (2016) ĝi havas proksimume la saman grandecon kiel Oslo.

La klubo uzas ĉambrom en la Kultura Domo posedatan de la grandurba komunumo. Tiu uzo estas senpaga por libervolaj organizoj.

Estis prezento de vojaĝo al Budapeŝto, kiu okazis post la UK en Nitra. Tio estis pli-malpli turisma vojaĝo. Fotoj kaj malgrandaj videoj estis prezentitaj. La riĉa arkitekturo elstariĝis kun emfazo sur la malsamaj epokoj kaj stiloj en la disvolviĝo de la ĝemela urbo. Tio reflektas la historian gravecon de Budapeŝto de romiaj tempoj tra la aŭstro-hungara Imperia erao ĝis moderna ĉi-taga Hungario. La urbo estas dividita en du partojn, Buda kaj Peŝto, per la rivero Danubo, kiun transiras de pluraj pontoj. Tiuj estis prezentitaj kaj kelkaj estas vere belaj. Estis malgranda diskuto kun demandoj post la prezento kiu daŭris proksimume 45 minutojn.

Poste estis manĝaĵo kun kafo aŭ teo. Ni havis kelkajn hejmfaritajn kukojn kiuj estis vere bongustaj. La kafoklaĉoj daŭris pliajn 30 minutojn ĉefe en Esperanto sed kelkaj uzis iomete la polan. Proksimume 20 personoj ĉeestis la kunvenon Tiu nombro estas multe pli granda ol en normalaj kunvenoj en Sinsen. Sed la loko de la Kultura Domo estas multe pli centra, proksime al la nova Centra Stacidomo kaj ne malproksime de Piotrkowska Strato, la ĉefstrato de Łódź.

---

## ***Informasjonsbod?***

*Vet du om en messe eller konferanse eller et lokalbibliotek, der det er mulig å sette opp en info-bod, eller legge ut brosjyrer? Si fra til kontoret!*

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94